

Heinrich Heine,
Lorelej

tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Ne scias mi, kial subita
malgaj' en la koro naskiĝis;
el tempo jam enterigita
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,
la Rejno mallaŭte babilas,
per oro de l'sun' en vespero
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:
en ora ornamo brilante,
sur supro de l' monto ŝi sidas,
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas
kaj kantas tra l' pura aero,
kaj forto mirinda sin trovas
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝipet' iras sur la rivero,
ŝipisto ekstremis de l' kanto,
kaj blinda por ĉiu danĝero
rigardas li al la kantanto.

...

Heinrich Heine,
The Lorelei

tradukita de Mark Twain

An ancient legend of the Rhine

I cannot divine what it meaneth,
This haunting nameless pain:
A tale of the bygone ages
Keeps brooding through my brain:

The faint air cools in the gloaming,
And peaceful flows the Rhine,
The thirsty summits are drinking
The sunset's flooding wine;

The loveliest maiden is sitting
High-throned in yon blue air,
Her golden jewels are shining,
She combs her golden hair;

She combs with comb that is golden,
And sings a weird refrain
That steeps in a deadly enchantment
The listener's ravished brain:

The doomed in his drifting shallow,
Is tranced with the sad sweet tone,
He sees not the yawning breakers,
He sees but the maid alone:

...

Heinrich Heine,
Lorelay

tradukita de Hans-Georg Kaiser

Min kaptas malgaj' en la koro,
pro kio tia trist' ?
Fabel' el antikva foro
ne lasas de mi kun persist'.

Aere fridetas, trankvilas,
malhelas jam la Rejn' .
La monto surpinte brilas
vespere en rava scen' .

Tre ĉarma feino sidas,
jen supre por ador' ;
la ora ornamo ridas ;
ŝi kombas harojn el or' .

Ŝi kombas per ora kombilo
kaj kantas kun pasi' ;
mirigas min la elbrilo
kaj forto de l' melodi' .

Ŝipisto ŝipeton gvidas,
lin kaptas ve' de ekzalt' .
Li ja la rifojn ne vidas' ,
li vidas nur supren sen halt' .

...

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela
perdiĝis sub l' akvoturnado;
ĝin Lorelej' faris kruela,
per sia mirinda kantado.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mu.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

The pitiless billwos engulf him!
So perish sailor and bark;
And this, with her baleful singing,
Is the Lorelei's gruesome work.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Anglan de Mark Twain.*

Arg-2-11 (2003-10-13 04:42:59)

A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leibzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880 (rf. <http://www.loreley.com/loreley/marctwai.htm>)

Mi kredas, ke ondoj tiras
la ŝipon funden de l' Rejn';
kaj tio de l' kant' eliras
de Lorelaj-siren'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)